DUA DIMANĈO DE ADVENTO – 6an de Decembro 2009

Komentario al la Evangelio de p. Alberto Maggi OSM

ĈIU KARNO VIDOS LA SAVON DE DIO

(Lk. 3, 1-6)

En la dek-kvina jaro de la regado de Tiberio Cezaro, kiam Pontio Pilato estis provincestro de Judujo, kaj Herodo estis tetrarĥo de Galileo, kaj lia frato Filipo tetrarĥo de la regiono Iturea kaj Traĥonitis, kaj Lisanio tetrarĥo de Abilene, dum la ĉefpastreco de Anas kaj Kajafas, venis la vorto de Dio al Johano, filo de Zeĥarja, en la dezerto.

Kaj li venis en la tutan regionon ĉirkaŭ Jordan, predikante la bapton de pento por la pardonado de pekoj, kiel estas skribite en la libro de la vortoj de la profeto Jesaja: Voĉo de krianto en la dezerto:

Pretigu la vojon de la Eternulo, rektigu Liajn irejojn!

Ĉiu valo leviĝos. Kaj ĉiu monto kaj monteto malaltiĝos . Kaj la malebenaĵo fariĝos ebenaĵo. Kaj la malglataj vojoj glatiĝos. Kaj ĉiu karno vidos la savon de Dio.

La tria ĉapitro de la Evangelio laŭ Sankta Luko malfermiĝas per bombasta kaj pompa maniero, ni nun aŭskultu kion skribas la Evangeliisto.

"En la dek-kvina jaro de la regado de Tiberio Cezaro", do la evangeliisto prezentas la ĉefojn de la homara povo. Ni scias ke la imperiestro opiniis esti la filo de Dio aŭ esti li mem Dio, "kiam Pontio Pilato estis provincestro de Judujo", do li havis la plej altrangan oficon en la tiuepoka Palestino, dum "Herodo estis tetrarĥo de Galileo, kaj lia frato Filipo tetrarĥo de la regiono Iturea kaj Traĥonitis", kaj la evangeliisto enŝovas en tiun ĉi liston "Lisanion tetrarĥon de Abilene", nome li regis en la Kontraŭ-Lebanono, li estis homo ne tro multe konata de la historiistoj, dum estis ĉefpastroj – kaj la evangeliisto enmetas du ĉefpastroj eĉ se la reganta ĉefpastro estis unu - sed ĉi tie la evangeliisto citas kaj Kajafas, kiu estis la tiutempe reganta ĉefpastro, kaj eĉ Anas, kiu estis la eksa ĉefpastro.

Kial la evangeliisto faras tiun ĉi liston? Ĉar li volas atingi la numeron sep, ni povus difini tiun ĉi liston la unuan G7 en la homa historio, ili estas la sep plej gravaj uloj el la terglobo, kaj la evangeliisto volas krei strecitecon.

Li metas en tiun liston la plej gravajn homojn. Tiuepoke oni opiniis Dion en la altoj kaj ĉiuj kiuj havis iun civilan aŭ religian povon estis konsiderataj kiel homoj plej proksimaj al Dio, do la evangeliisto kreas suspenson.

Tie ĉi li enmetas ĉiujn gravulojn de la terglobo, la homojn plej proksimajn al Dio, kaj el la civila medio kaj eĉ el tiu enmiksita en la religia medio, kiel la imperiestron , kaj tiu de Judujo kun la ĉefpastroj. Kaj jen la suspenso… kiam ni legas la Evangelion ni ĉiam devas nin meti sur la lokon de la unuaj aŭskultantoj, "venis la vorto de Dio al"- al kiu sin turnos Dio, ĉu al imperiestro, kiun la romianoj konsideris filo de iu Dio? Aŭ, ĉu Li sin turnos, pli ĝuste, al ĉefpastro kiu estis la surtera reprezentanto de Dio mem? Do, la evangeliisto kreas momenteton da strečiteco.

El inter ĉiuj tiuj gravuloj, la plej proksimaj al Dio, la vorto de Dio al kiu venos? Kaj jen la surprizo: "Venis la vorto de Dio al Johano, filo de Zeĥarja, en la dezerto". Tio, kion la evangeliisto diras, estas gravaĵo. Ni jam konas Sanktan Johanon la baptiston, la evangeliisto jam prezentis lin al ni, sed estas sensacia okazaĵo, li estas la unue naskita filo de Zeĥarja, li estas pastro kaj, kiel tia, ĉe sia dekokjariĝo li devis sin prezenti al la templo en Jerusalemo por esti ekzamenata kaj por ke oni konstatu ke li eĉ ne havas la plej malgrandan malvirton kiu malhelpu la pastran aktivadon.

Tiuepoke la pastreco estis hereda eco, ekzistis pastra idaro kaj familioj, kontraŭe Johano ne estas tia. Sankta Johano la Baptisto, kiun la evangeliisto prezentas al ni jam plenplena je Spirito ekde la komenco de lia ekzisto, li tute ne iras al la templo, sed li eliras el la templo, li iras en la dezerton. Ĉar Johano ne estos pastro, sed li estos la homo de la Spirito. Li ne estos la homo de la rito sed la homo de la vivo.

Do, la vorto de Dio preterflugas la palacojn de la povo, la vorto de Dio preterlasas la lokojn de la religiaj institucioj kiujn li jam konas kiel tute rezistajn al siaj mesaĝoj, ĉar Dio estas amo kaj kie estas la povo kiu superregas la homojn Lia vorto ne povas esti konata.

En la Evangelio laŭ Sankta Luko tiel komenciĝas tio, kion ni povus nomi la "malpastrecigon" de la popolamaso fare de Dio. Do, komenciĝas la tuta malkonstruado kaj nalkonsekrado de la popolamaso fare de Dio. Kaj kion faras Sankta Johano la Baptisto? "Li venis en la tutan regionon ĉirkaŭ Jordan". La rivero Jordano memorigas al ni la liberigon, la riveron kiu devis esti transpasita por eniri la promesitan landon, "li venis predikante la bapton de pento por la pardonado de pekoj".

Kion tio signifas? Bapto signifas plenan mergiĝon, do ĝi estis formala ritaĵo de mergiĝo de la individuo kiu devis simboli "la konvertiĝon". En la greka lingvo oni povas esprimi laŭ du signifoj la konvertiĝon, unu kiu indikas la revenon al Dio kaj tiu estas la religia konvertiĝo, kaj la evangeliistoj evitas uzi tiun terminon. La alia dirmaniero, kiu estas tiu uzata de la evangeliisto, estas "metanoia", kiu kontraŭe indikas radikalan ŝanĝon de pensmaniero, kiu poste reflektiĝas eĉ en la sintenon.

Ni vidos kiel en la Evangelioj tiu konvertiĝo signifas aldirekti alimaniere sian ekziston mem. Se vi ĝis nun vivis por vi mem, nun vi vivas por la aliuloj. Nu estas tiu konvertiĝo kiu okazigas la pardonon, la forviŝon de la pekoj, nome la malĝustan irvojon de la vivo mem.

Sed Johano estas defianta la organizaĵon. Ekde ĉiam oni opiniis ke la pardono de la pekoj okazas ĉe la templo en Jerusalemo kaj tio trudiĝis en la religio. Ne Johano ne akordas pri tio kaj eĉ ne Dio akordas. Ne estas ritaĵo tio kio povas pardoni la homan pekon sed estas la ŝanĝo de lia ekzisto, la alidirektado de lia vivo.

Ne estas liturgia rito en la templo kiu povas forviŝi tion kio malpurigas la homon, sed estas la ŝanĝo en la orientado de lia ekzisto mem. Do, Johano predikas bapton kiel signon de konvertiĝo, de ŝanĝo por la pardono de la pekoj.

Kaj tie la evangeliisto citas profeton Jesaja-n, la ĉapitrojn de la 40a ĝis la 55a kiuj ne estas de profeto Jesaja, ili estas de iu anonima profeto kiu ilin enmetis sub ilian nomo, kaj tiun ĉi parton de la libro oni nomas "La libro de la Konsolo", ĝi komenciĝas per la versegoj: "Konsolu, konsolu Mian popolon" kaj temas pri la anonco de la liberigo el la babilona mallibereco.

Ĝi estas la eliro de Babilono al Jerusalemo. Tiam profeto Jesaja anoncas: "Sonas voĉo de krianto: Pretigu en la dezerto la vojon de la Eternulo, rektigu en la stepo irejon por nia Dio. Ĉiu valo leviĝu, kaj ĉiu monto kaj monteto malaltiĝu, kaj la malebenaĵo fariĝu ebenaĵo, kaj la montaro fariĝu valo". Kaj jen ĉe la fino la evangeliisto kiu eĉ libere uzas tiun citaĵon de Jesaja, ĝin li modifas: "Ĉiu karno vidos", la teksto de Jesaja diris: "la gloron de Dio", sed Sankta Luko skribas: "la savon de Dio".

La gloro de Dio konsistas el la savo de ĉiu homo. Kaj tiu esprimo poste estos denove citita en la "Agoj de la Apostoloj" ĉe la 10a ĉapitro, en la versego 28a kiam Sankta Petro diros: "Ĉar Dio min admonis, ke mi ne nomu ian homon profana aŭ malpura". Komenciĝis la eliro el la religia institucio por malkovrigi al la homaro la amon de Dio kiu ne diskriminacias, ne limigas, ne disigas, sed por montri amon de Dio kiu sin turnas al ĉiu homo.

Tiu estas la Bona Novaĵo alportita al ni de Sankta Luko.